



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 44/77 - 9 nov 1977

Aperas ĉiusemajne

Reabonu nun

Pilo-Press

por 1978

Ĵara abonprezo

30,-- DM

Kun germana END 40,-- DM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pidel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Klasika koncerto kaj magia sorĉado

Herzberg (pp) - Dum la Esperanto-semajnfino en Herzberg de la 4-a ĝis la 6-a de novembro elstaris tri programeroj: koncertvespero, harcmontara ekskurso kaj sorĉvespero kun Triksini.

Elektante la gimnazian aŭlon por la vendredvespera koncerto "De l' opero al popolkanto" oni tro optimisme taksis la nombron de la aŭskultontoj, ĉar nur parto el ĉ. 80 aliĝintoj jam ĉeestis. Sed tiuj, kiuj nur sabaton alvenis, ja bedaŭris la maltrafon de tia muzikarta frandaĵo. Blovorkestro el "kormontaj" gejunuloj enkondukis per uverturo. Sekvis ses konataj operkantoj, nome la dueto "Aŭdu kara" el "La vendita fianĉino" (Smetana), el Don Pasquale (Donizetti) la sopran-ario "Komprenas mi la arton ja", el la Stelĉasisto (Lortzing) la bas-revo pri "Kvinmil taleroj", el la sorĉfluto (Mozart) la dueto "Ĉe viroj kiuj sentas amon", el "La gajaj virinoj" (Nicolai) la tenor-ario "Kantas en la bosk' alaŭdo" kaj kulmine la dueto "Min feliĉigas la vorto" el Don Pasquale (Donizetti). La infanĥoro - ruĝeblanke kostumitaj knabinoj - finis la klasikan parton per "Ĝojo, vi fajrer' dia" (Beethoven/Schiller).

La bonegaj, multplaŭditaj solistoj de tiu parto: Anni Wiesmann (soprano), Alfons Hoffmann (tenoro), Welter Lange (baso), akompanitaj jen de Ulrich Mattke, jen de Beate Lange, readiĝiĝis ankaŭ dum la dua parto, subtenante ĥoron kaj blovorkestron aŭ sole kantante, dufoje eĉ kune kun la tuta spektantaro. Jen kelkaj titoloj: Anjo de Tharaŭ, Ĉe l' put' antaŭ pordego; Nek fajro, nek karbo; La etaj floroj dormas; La luno jam leviĝis; Sidas sur l'flava ĉaro....Jen vesperprogramo plenplena je perloj muzikaj, ĉu klasikaj ĉu popularaj, ĉio en bonege adaptitaj Esperanto-tradukoj de Joachim Giessner.

La sabata ekskurso tral' Harcmontaro per malgranda aŭtobuso ĉe favorega vetero kondukis dufoje tra la aŭtune ornamita altaĵo: unue laŭlonge de la DDR-limo ĝis Bad Harzburg kaj de tie al Goslar kaj reen tra Clausthal-Zellerfeld kaj Osterode.

Reveninte plenplenaj je impresoj, jen atendis tute alispeca travivaĵo. Triksini, la magiisto kun la Blua Ŝtono prisorĉis per "magia salo" kaj "simsalabimo" gazetojn, ĉapelojn, kruĉojn, kravatojn, ludkartojn kaj ŝnurojn. La publiko miregis, ridis, aplaŭdadis kaj - tutapude - la gasto multon eksciis pri la Internacia Lingvo. Enkonduke kaj postfine de la magia programo ludis la sespersona akordeona ensemble Bartels el Herzberg kun altgrada lerteco kaj sindono. Sed laŭ mi estis iom tro da programo, je la fino mankis la atentemo, kiun ili meritis.

Dimanĉe estas la Tago de la Sinjoro. La magiisto Triksini retransformiĝis en pastron Kindler el Luksemburgo kaj frumatene jam celebris Sanktan Meson. Tagmeze li akceptis la lacajn migrantojn, kiuj revenis de traŭba promenado, en la preĝejo por ekumena diservo en Esperanto, aranĝita kune kun pastoro Brinkmann el Westerland.

Kun la komuna tagmanĝo finiĝis tiu travivoriĉa semajnfino, dum kiu ankaŭ okazis provinstruado, daŭre funkciis ekspozicio kaj librostendo. Multajn spertojn kolektis certe la junaj organizantoj, sub verva gvido de Peter Zilvar, sindone subtenitaj i.a. de Werner Heimlich, Wolfgang Zietz kaj edzino. Sinceran dankon al ĉiuj kunagintoj.

Ritt.

Pri konkursoj por tradukoj el la germana

UEA nuligis la tradukan parton de la Belartaj Konkursoj, ne ĉar ĝi estis malgraviginta, sed ĉar oni konstatis sian malkapablon juĝi tradukaĵon ne komprenante la originalon.

Tradukado tamen estas tre grava, eĉ necesa por nia lingvo. Pri tio plej bone konsciis jam Zamenhof. Se li tuj publikigus sian projekton, ĝi fariĝus mortnaskito kiel multaj aliaj lingvoprojektoj. Sed Zamenhof dum jaroj tradukis gravajn verkojn tiel riĉigante kaj fleksemitante la lingvon, dum se li verkus nur originale, li facile adaptus siajn tekstojn al la ebleco de la teorie elpensita sistemo.

Kion mi celas? Angloj kaj italoj jam estas antaŭ ni: ili fondis por siaj lingvoj tradukkonkursojn sub aŭspicio de UEA. Mi pensas, ke estas nun la ĝusta momento por ni germanlingvanoj iniciati similan konkurson por tradukoj el la germana. Kiu havas la kuraĝon entrepreni ion tian?

Klaus Schubert, Hindenburgufer 80/81, D-2300 Kiel 1

Studo pri elstara humanisto Jakob Banisius - Helpo serĉata

Jugoslava samideano, lic. Marinko Ĝivoje, pretigas studon pri Jakobus Banisius (1466 - 1552), elstara eŭropa humanisto kaj diplomato, kiu estis en servo de romĝermana imperiestro Maksimiliano, la Unua, sekretario de lia heredanto Karlo, La Kvina, same en servo de papo Leono, la Deko. Filozofion kaj teologion li studis en Bologno kaj Padovo, ekde 1512 li estis dekanato de Trenta kaj Antverpena kapituloj. Li korespondis kun Erasmo, kardinalo Pietro Bembo kaj germana humanisto Pirckheimer. Li estis amiko de A. Dürer.

Dokumentoj pri li troviĝas en Trento, Romo, Torino, Venecio, Londono kaj devus troviĝi ankaŭ en Vatikano, Augsburg, Innsbruck, Nürnberg, Gurk, Worms, Basel, Antverpeno, Parizo, Vieno, Budapeŝto, Milano, Bruselo kaj certe en ankoraŭ aliaj arkivoj - bibliotekoj de Eŭropo.

Estas afable petataj kleraj kaj helpipretaj samideanoj en menciitaj kaj aliaj eŭropaj urboj, kiuj posedas ordigitajn malnovajn arkivojn kun laŭnomaj katalogoj esplori ĉu eble tie troviĝas iu dokumento ligita al la nomo de Jakobus Banisius (Bannicius de Bannisis), kaj se jes kiel eble plej baldaŭ informi al la adresato:

Marinko Ĝivoje, P.p. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio.

Dankesprimo sekvas ankaŭ en la verko (nacilingva), aperonta meze de la jaro 1978 kun resumo en Esperanto.

(Represo kaj diskonigo petata!)

Esperanto instruata en 22 lernejoj de Kroatio

Zagreb (mĝ) - Laŭ ankoraŭ nekompletaj informoj Esperanto estas instruata en 22 elementaj lernejoj de 10 urboj de Kroatio. La lingvo estas instruata ankaŭ en aliaj lernejoj de aliaj respublikoj de Jugoslavio, sed la informoj ankoraŭ estas kolektataj. La lingvon oni instruas ĉefe laŭ la internacia lernolibro de I. Szerdahelyi aŭ laŭ la lernolibro de d-ro Dušan Maruzzi. Krom tio Esperanto estas instruata al plenkreskuloj ĉu en Esperanto-societoj ĉu pere de korespondanta kurso aŭ aŭtodidakte.

Pri Eŭropa Dokumentaro

Laŭ informo de la eldonato, Eŭropa Dokumentaro ekde la 1-a de januaro 1978 ne plu aperos. La kaŭzo de la ĉesigo verŝajne estas nesufiĉa nombro da abonantoj.

PILO-PRESS gratulas

S-ro Heinrich Nischwitz (Postfach 253, D-6140 Bensheim), kasisto de Germana Esperanto-Asocio, festos la 18-an de novembro la 70-an datrevenon de sia naskiĝo.

Dum pli ol 50 jaroj s-ano Nischwitz aktivas en la germana Esperanto-movado, ĉu kiel funkciulo de loka aŭ regiona organizaĵoj, ĉu kiel vicprezidanto, trezoristo aŭ kasisto de Germana Esperanto-Asocio.

Heinrich Nischwitz estas unu el la plej meritplenaj aktivuloj de la germana Esperanto-movado, al kiu Germana Esperanto-Asocio multon dank-suldas. Li vere estas la "bona spirito" de GEA, ĉiam modesta, ĉiam helpipreta.

Ni kore al li gratulas! (Ampleksa datrevena artikolo aperos en la venonta numero de Pilo-Press)

Sian 90-an naskiĝtagon festas la 9-an de novembro la aŭstra esperantisto, direktoro Leonhard Schmid, Klagenfurt. Lerninte Esperanton en la jaro 1908, direktoro Leonhard Schmid aktivis kaj ankoraŭ aktivis por ĝi dum sia tuta vivo.

El intervjuo kun s-ro Klatil
(Iaŭ Esperanto-Informoj - ORF-Regional)

S-ro Vokal (V): Saluton, samideano Klatil, kaj bonvenon en Vieno. Rakontu al mi, ĉu dum la lasta tempo okazis en Granda Britio iu nova koncerne Esperanton.

S-ro Klatil (K): Jes, la aferoj tie komencas moviĝi. Ekzemple la antaŭ kelka tempo fondita tiel nomata Esperanta "influ-grupo" en la brita parlamento atingis membrostaton de 55 parlamentanoj de diversaj politikaj partioj.

V: Ĉu vi povas klarigi al mi, kian taskon havas tia "influ-grupo"?

K: Tio estas grupo de parlamentanoj, kiuj konsentis subteni la progreson de Esperanto kaj devigis sin, voĉdoni pozitive, se ekzemple en la parlamento estus prezentata leg-propono, celanta enkondukon de Esperanto en la lernejojn, aŭ aliajn aranĝojn favore al tiu lingvo.

V: Mi nun komprenas, ke tia "influ-grupo" povus certe multe utili al la disvastigo de Esperanto.

K: Sendube la dua grava evoluo estas la fondo de speciala sindikata kaj kooperativa Esperanto-grupo. La graveco konsistas ĉefe en la fakto, ke eminentaj personoj en la brita sindikata kaj politika movadoj subtenas tiun entreprenon. Unu el la plej influaj sindikataj gvidantoj, Jack Jones, akceptis la honoran prezidantecon kaj la ĝenerala sekretario de la nun reganta laborista partio, Ron Hayward, la honoran vicprezidantecon. Okaze de iu kunveno, kiun partoprenis ankaŭ la pola ambasadoro Ron Hayward menciis la 90-jaran jubileon de Esperanto kaj eĉ deklaris, ke Esperanto prezentas vere demokratan kaj praktikan solvon de la tutmonda lingva problemo.

V: Per tiu deklaro li pruvis, ke li ĝuste komprenas la rolon de Esperanto en la socio.

Novaj eldonaĵoj de Fremdlingva Eldonejo Pekino

- 1-Es-966P Maŭ Zedong Pri dek gravaj interrilatoj, 13 x 18,6 cm,
30 p., prezo 0,60 GM
88Es-134P Kvin herooj sur Langja-monto, bildrakonto en koloro,
18,5 x 17,3 cm, 36 p., prezo 1,30 GM

Esperanto en Radio

Konkursanonco de Pola Radio

Ni turnas nin al vi kun la peto, ke vi bonvolu skribi al ni pri jenaj aferoj:

- Ĉu vi estis en Pollando? Se jes - kiajn impresojn vi elportis el tiu estado?
- Menciuj la atingaĵojn, kiuj - laŭ via opinio - pliproksimigis al la mondo la bildon de la nuntempa Pollando.

Respondo jam nur pri unu afero rajtigas vin partopreni lotadon de premioj. La premioj ampleksas: ĉefpremiojn (10-taga ekskurso tra Pollando;)valorajn objektajn premiojn.

La leterojn ni petas direkti laŭ la adreso:

Pola Radio, poŝtkesto 46, PL-00-950 Varsovio 1, Pollando

en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso" - ĝis la 31-a de decembro 1977 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn de la konkurso ni anoncas la 31-an de januaro 1978

Pola Radio, Varsovio

Pri la radio-spertoj de d-ro Kondor

Polan Radion nuntempe mi ne tute klare povas kapti, almenaŭ komence ne, nur post certa tempo plifortiĝas la voĉo.

Ĉe Radio Bern (Svisa Kurtonda Radio) mi estas tute ŝokita, ĉar nek lunde nek merkrede vespere, je la 19-a horo io ajn envenis! Kaj mi konas bone la lokon, kie ĝi estas ĉiam kaptebla!

ORF normale estas kaptebla. Radio Roma lastajn du dimanĉojn aŭ tute ne aŭ nur malforte estis aŭdebla. Kontraŭe: Radio Vatikana estas ĉiam bonege, klare aŭdebla! La voĉo de P. Biedulski estas kvazaŭ veluro mola por la oreloj! Gratulon al li kaj pluaajn sukcesojn.

La situacion malfavoran rilate Svisan Kurtondan Radion ni povas konfirmi. Ankaŭ en Nürnberg la elsendoj sur ondo kutima 48,66 m (6 165 khc) ne estis aŭdebla. La elsendo estis kaptebla nur sur ondo 75,28 m (3 985 khc). Estas vere bedaŭrinde ke la aŭdkondiĉoj tiom draste malboniĝis, des pli ĉar sur la ondo 75,28 m regas multe da perturboj kaj interferoj. Kiajn spertojn havas aliaj aŭskultantoj?

ORF: Citaĵo el la semajna komentario de 29/30 okt 1977 de d-ro Alfred Macher: "Ankaŭ la 150-a de la interparoloj, kiuj okazas en Vieno, pri la alcelata okcident-orienta redukto - aŭ almenaŭ limigo - de la superpotenca vetarmado, pruviĝis malesperige senrezulta.

Eble ankaŭ pro tio, ke la tutmonda armad-industrio timas redukton de siaj grasaj profitoj. Oni pripensu: en ĉiu minuto la mondo elspezas unu milionon da dolaroj por armeoj kaj militpreparoj!"

Pri la aŭdebleco de Radio Roma

Pri la aŭdebleco, ni esperas, ke ekde novembro ĝi pliboniĝos, ĉar oni direktos la ondojn ne nur al Norda Eŭropo, kiel ĝis nun, sed ankaŭ al Orienta Eŭropo, kaj unu ondo estos al ĉiuj direktoj, tiel ke, almenaŭ principe, ni devus iĝi aŭdeblaj en la tuta modno; kun scivolemo ni atendas raportojn pri aŭdebleco el "nekutimaj" landoj. (El leterkesto de RR)

El Nagasaki, Japanujo, s-ro Kozi Sato skribas: Mi facile aŭdas, per mallongaj ondoj, Radio Pekinon, sed ne la eŭropajn staciojn. (RR)